



La plej valora estas la SupraDekstra angulo.




Diag. 1 (Du plej valoraj 'lim-aranĝoj' 'a' kaj 'b') Rimarkinde gravaj estas 'suben-iri' N-a kaj 'kapti blankajn ŝtonojn' per N-b. Pri la du 'lim-aranĝoj' iuj el vi, lengantoj, eble unuavide sentas, "Sendube pli valora estas 'b'."


Nun ni kalkulu.



Diag. 2 Unue N1. La valoron oni kalkulas,...




Diag. 3 komparante kun B1, 'bati'.
{paĝo 110 de la originalo}




Diag. 4 (Nigro rajtas ŝtonmeti N1)


Post ▲, 'metrajton-tenanta' estas N1. Oni taksas ke Nigro rajtas ŝtonmeti ĉi tiun.




Diag. 5 Blanko ne havas alian rimedon ol respondi 'saltante' kiel B2. Sekvante, Nigro 'salti-tuŝmetas' kiel N3.




Diag. 6 Nepre procedas B4 ĝis 'sinligo' B6. Poste plue...




Diag. 7 (Oni taksas tion.) Nigro rajtas ŝtonmeti N1 (tenante 'metrajton'). Blanko respondas per B2 kaj la 'lim-aranĝo' ĉi tie finiĝas. Ĉi tiel, principe oni taksas, ke, kie nur unuflanko povas ŝtonmeti 'metrajton-tenante', tie ĝi uzos la rajton ŝtonmeti.



Diag. 8 Due ni esploru la kazon kiam Blanko 'batas' kiel ▲. En ĉi tiu formo, ambaŭflankoj ne havas rajton poste ŝtonmeti, sed nur eblecon. Tio estas, ke...
{paĝo 111 de la originalo}




Diag. 9 (Blanka 'lim-aranĝo') B1, per kiu Blanko kaptas nigrajn du ŝtonojn ▲,...



Diag. 10 (Nigra 'lim-aranĝo') kaj N1 per kiu Nigro savas siajn du ŝtonojn ▲... ambaŭ estas 'metrajton-perdantaj', kaj ambaŭflankoj havas duonan eblecon por ŝtonmeti ĉi tien.


Same kiel antaŭe skribitaj, en tia situacio oni prenas la mezon de la ambaŭ kazoj. Kiel preni la mezon...?

Pri diagramo 9, {laŭ japana regulo} la ludo devus finiĝi en la stato. Kaj poste...



Diag. 11 Blanko 'forkaptas' per ⊙ kaj Nigro 'sinligas' per ⊙.

Aliflanke, se Nigro ŝtonmetas N1 en diagramo 10,...




Diag. 12 poste 'ŝtopiĝas liberpunktoj', ▲ ▲.

Komparante diagramon 11 kun diagramo 12, Nigra teritorio estas sama, kaj Blanka teritorio multiĝas je 6 poentoj (4 poentoj de 'spuro de forkapto' 'a' plus 2 poentoj de 'b'). {paĝo 112 de la originalo}


Kiam Blanko ŝtonmetas B1 en diagramo 9, Blanka teritorio fariĝas 6 poentoj.

Kiam Nigro ŝtonmetas N1 en diagramo 10, Blanka teritorio fariĝas nulo.

Prenante la mezon, Blanka teritorio kalkuliĝas je 3 poentoj.



Diag. 13 Konklude en la stato kiam Blanko 'batas' kiel ▲, oni taksas ke en la angulo (ĉe punktoj 'a') blanko havas 3 poentojn.




Diag. 14 (Rezulto de Nigra 'lim-aranĝo'. Reapero de diagramo 7) Ĉi tio estas rezulto de Nigra 'lim-aranĝo' .

Komparante ĉi tiuj diagramojn, oni povas kalkuli, ke Nigra teritorio diferencas je 4 poentoj kaj Blanka teritorio je 10 poentoj (pri Blanka teritorio sumigante 3 poentoj de 'a' kaj 7 poentoj de 'b', kaj pri Nigra teritorio 4 poentoj de 'c').

Resumante la valoro de 'lim-aranĝo' ĉi tie kalkuliĝas je 14 poentoj.


Alivorte, ĉar en kazo kiam Nigro 'suben-iras' kiel N1 en diagramo 2, komparante kazo kiam Blanko ŝtonmetis B1 en diagramo 3, Nigra teritorio multiĝas je 4 poentoj, kaj samtempe nuligas la eblecon de 10 poentoj da Blanka teritorio en diagramo 13. Sumigante tiujn, kalkuliĝas "14 poentoj da diferenco".

{paĝo 113 de la originalo}



Diag. 15 Sekvante, Kiom valoras la 'sinligo' N1.


Ankaŭ por kalkuli la valoron, oni devas 'preni mezon' kutime. Ĉar...




Diag. 16 (Duonan eblecon ambaŭflankan por ŝtonmeti sur 'a') Post kiam Blanko 'sinligas' per B1, restas 'ambaŭflanke metrajton-perdanta' 'lim-aranĝo' 'a'.

Ankaŭ en ĉi tiu situacio, oni devas supozi ambaŭajn kazojn, ke Nigro ŝtonmetas 'a' kaj ke Blanko ŝtonmetas 'a', preni la mezon, kaj kompari ĝin kun diagramo 15.

La kialo estas, ke...




Diag. 16 (Kiu ŝtonmetos sur 'a'? La eblecon estas duono.) post Blanka 'sinligo', B1, restas 'ambaŭflanke metrajton-perdanta lim-aranĝo' sur punkton 'a'. Ankaŭ en ĉi tiu kazo, oni devas supozi diagramojn kiam Nigro ŝtonmetas N-a kaj kiam Blanko ŝtonmetas B-a, preni la mezon, kaj kompari ĝin kun diagramo 15.



Diag. 17 (Supozo I) De antaŭa diagramo, se Nigro 'forkaptos' du ŝtonojn per N1, Nigro gajnos 4 poentojn da teritorion ĉi tie.

{paĝo 114 de la originalo}




Diag. 18 (Supozo II) Aliflanke se Blanko 'sinligas' per B1, Nigro ne gajnas teritorion ĉi tie. Do oni taksas 2 poentojn da Nigra teritorio ĉi tie {en la kazo de diagramo 16}.

Revenante al diagramo 15, Kiam Nigro ŝtonmetas N1, Nigro gajnas 14 poentojn (la 6 'kaptitoj' kalkuliĝas je 12 poentoj, kaj 2 poentoj de punktoj 'a').

Aliflanke, kiam Blanko ŝtonmetas B1 en diagramo 16, Nigra teritorio taksigĝas je 2 poentoj.

Sume la valoro de 'lim-aranĝo' ĉi tie kalkuliĝas je "12 poentoj da diferenco". (Blanka teritorio ne diferencas, kaj oni devas pripensi nur pri Nigra teritorio.)



Diag. 19 (Ĝusta kurso 1-8) Laŭ la supra esploro, procedas la ĝusta kurso ĝis 8a meto. {paĝo 115 de la originalo}

Unue Nigro ŝtonmetas N1 valoran je 14 poentoj, due Blanko ŝtonmetas B2 valoran 12 poentoj. Ĉi tiam Nigro devus uzi rajton, 'lim-aranĝi tenante metrajton' ek de N3. Ne pre estas por Blanko respondi ĝis B8.

En ĉi tiu formo, kiel montrita ĉe diagramo 7, Nigro havas rajton por plue 'lim-aranĝi' kiel N-a kaj B-b, tamen ne urĝe estas uzi la rajton {, ĉar restas pli valoraj 'lim-aranĝoj'}.

Nun post B8, sekvanta problemo estas, kiun el du ŝtonmentoj, kapti unu ŝtonon ☉ en la Dekstra rando kaj kapti ▲ en la SupraMalDekstra angulo, Nigro devus elekti.